# HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Esperanto, Internacia lingvo

:



**Partoprenantoj en la ĝenerala kunsido de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio**

**2**
**---------- 61-a jarkolekto**
**2017**

Hungara Fervojista Esperanto - Asocio

**HUNGARA FERVOJISTA MONDO**
**Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado en Hungario**
**Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.**
..................................................................
**Respondeca redaktoro:**
**István Gulyás**
**Eldonas:**
**Hungara Fervojista Esperanto-Asocio**
**Hungara Sekcio**
**de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio**
**Poŝta adreso: HU-1155 Budapest**
**Rákos út 98. I/9.**
**Aperas kvaronjare**
**Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000**
**al eksterlanda adreso: EUR 12**
*
**MAGYAR VASUTAS VILÁG**
**A magyar eszperantista vasutasok központi lapja**
**Felelős szerkesztő: Gulyás István**
**Kiadásért felelős**
**A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület**
**„Szkenguru" Nyomda Budapest**
**Felelős vezető: Balla László**
..................................................................
**ISSN 0230-323x**
..................................................................

## ENHAVTABELO:

| | | |
|---|---|---|
| **22.** | **I. Gulyás:** | Internacia amikeco |
| **23.** | **I. Gulyás:** | Ĝenerala kunsido ĉe ni |
| **26.** | **J. Halász:** | La aventurparko Zemplén (Dua parto) |
| **29.** | **L. Gabalda:** | La 11-a Novjara Renkontiĝo |
| **31.** | **J. Halász:** | Al Andalus |
| **34.** | **I. Gulyás:** | Naturparkoj en Hungario |

**61-a jaro N-ro 2, APRILO - JUNIO**

# INTERNACIA AMIKECO

En la lasta semajno de februaro estis la 49-a semajno de "Internacia Amikeco". Tiu celas doni al esperantistoj la okazon por fortigi la reciprokajn kontaktojn kaj senton de komuneco. La revoluciaj ŝanĝoj sur la tereno de la komunikado per interreto, skajpo aŭ fejsbuko donas novajn eblecojn al la nuntempaj kontaktoj. Kompreneble tio ne signifas, ke ni povas kaj volas forgesi tiujn, kiuj ankoraŭ signifagrade fidelas al la tradiciaj kontaktrimedoj. Tamen la ĉefa celo estas por fortigi la reciprokajn kontaktojn. Tio signifas, ke ni devas informiĝi pri la reciprokaj agadoj kaj planoj. Ni ne uzu la komunikilon por kvereli kaj humiligi la aliajn, sed ni montru la amikecon kaj la interkonsenton. Ni fervojistaj kaj ne-fervojistaj esperantistoj donu ekzemplon pri la kunlaboro kaj pri la unueca pensado. Nur per komuna volo ni povas defendi nian belegan ideon, la Esperanto-movadon. La semajno de Internacia Amikeco helpas al ni trovi la taŭgan vojon al la komuna agado, al la estimo unu de alia.

La jaro 2017 estas la Zamenhof-jaro, kiu montras al ni, ke la Esperanto-movado ĝis nun jam travivis malfacilajn tempojn, sed tamen ankoraŭ vivas, kaj laŭ mia opinio kaj espero plu vivos kaj plifortiĝos. La Esperanto-movado bezonas komunan laboron, amikecon por atingi tiujn noblajn celojn.

**István Gulyás**

# ĜENERALA KUNSIDO ĈE NI

Mi havis surprizon, kiam komencis nia ĝenerala kunsido en la rezidejo de Hungaria Esperanto-Asocio. Ĉiuj fakgrupoj kaj membroasocioj reprezentis pere de oficialaj deputitoj en la kunsido, eĉ el *Tata* partoprenis kvin, el *Budapest, Nyíregyháza, Győr* du, kaj el *Szombathely, Zalaegerszeg, Pécs, Miskolc* kaj *Kiskunhalas-Kelebia* unu deputitoj. Tiel la kunsido havis kvorumon.
Estis granda honoro, ke partoprenis en la kunsido la nova prezidantino de HEA. La honora prezidanto de VOKE – s-ro *Gábor Pál* – antaŭe promesis la partoprenon en la kunsido, sed intertempe li ricevis alian taskon, kaj li nur sendis salutmesaĝon dezirante bonan laboron kaj sukceson.



*La prezidanto salutas la partoprenantojn*

La kunsido komenciĝis kun la kutimaj proceduroj, inter ili la salutvortoj de la prezidanto, la konstatado de la decitkapablo, la akcepto de la tagordpunktoj kaj la rememoro pri tiuj membroj, kiuj mortis en la pasinta jaro: **Pál Hepp** gvidanto de la debrecena fakgrupo, kaj **D-ro Endre Dudich** honora prezidanto de HEA, honora membro de UEA, kiu multe helpis la agadon de la fervojistaj esperantistoj, kaj partoprenis en multaj niaj renkontiĝoj. La prezidanto rememoris pri la 60-jara jubileo de la fondaĵo de la Fervojista Fako de la Hungara Esperanto-Asocio.
Poste sekvis la raporto de la estraro de nia asocio, kiun prezentis la sekretario. La raporto enhavis indikojn de la membro-nombro, laŭ kio la asocio havas 463 membrojn, inter ili 132 aktivajn, 78 pensiulajn kaj 256 protektantajn membrojn. Se ni nur kalkulas pri la membro-nombro de la ses fakgrupoj, ankaŭ ni ricevas bonan rezulton, ĉar la fakgrupoj entute havas 195 membrojn, inter ili 38 aktivajn, 29 pensiulajn kaj 125 protektatajn membrojn. El la membraro estas 15 IFEF-membroj, 3 dumvivaj kaj 5 individuaj membroj de UEA. La raporto taksis la plenumitajn taskojn en la jaro 2016, kaj difinis la ĉi-jaran agadon. La raporto konstatis, ke – malgraŭ la financaj problemoj kaj aliaj malbonaj cirkonstancoj – nia asocio plenumis la entreprenitajn taskojn, escepte kelkajn tiujn taskojn, kiujn la monmanko ne ebligis plenumi. Tiel estis la presado de la historia materialo de nia asocio, aĉeto vortaroj kaj aliaj periodaĵoj, apogo de la fakgrupoj k.a. Rilate al la pasintjara buĝeto la raporto rimarkis, ke la planitaj membrokotizoj kaj la abonprezo de HFM superis la efektivajn enpagojn, sed bedaŭrinde la VOKE-apogo kaj enspezo el la 1% de persona laŭenspeza imposto grave malpliiĝis.

La Kontrola Komitato ekzamenis la mastrumadon de nia asocio, kaj konstatis, ke la librotenado estis laŭfaka, la estaĵoj estis laŭregulaj. La Komitato analizis la efikon de la monmanko, kaj proponis al la ĝenerala kunsido la akcepton de la raporto de la Komitato. La laborplanon la deputitoj de la kunsido sen ŝanĝo akceptis, kaj proponis, ke laŭ tiu laborplano pluagadu nia asocio. Same akceptis la deputitoj la nunjaran buĝeton.
La prezidanto de nia asocio iomete detale parolis pri la agado de UEA, IFEF kaj HEA. Li konstatis, ke la Esperanto-movado havas krizon. Mankas gejunulojn en ĉiu tereno de Esperanto. Bedaŭrinde rapide maljuniĝas la movado, ne estas tiuj junuloj, kiuj povus transpreni la ŝtafetbastonon de la maljunaj movadanoj. Tiu fakto montriĝas ĉefe en la fervojista movado, kie kontinue malaltiĝas la membro-nombro de la landaj asocioj. En la fino de la pasinta jarcento la membro-nombro de IFEF estis pli ol 2000, nun nur 350, ĉesis el la 26 landaj asocioj 10, inter ili Kubo, kiu antaŭ unu jaro aliĝis al IFEF, kaj fine de la pasinta jaro anoncis la ĉeson. La situacio estas sama ĉe la IFEF-kongresoj, kie partoprenis antaŭ dudek-tridek jaroj 400-500 personoj el 22-25 landoj, kaj ekzemple en la pasinta jaro en Varna la nombro de la partoprenantoj estis 96 el 12 landoj. Ni povus vicigi la negativajn faktojn, sed ni devas esperi la plibonigon, kaj pli forte kaj entuziasme agadi por Esperanto. Dank' al Dio, ke nia asocio havas stabilan membro-nombron, sed ankaŭ ĉe ni mankas la gejunuloj. Fine la prezidanto akcentis la gravecon de la instruado.



*La deputitoj aŭskultas la raporton de la estraro*

Poste la prezidantino de HEA salutis la kunsidon, kaj akcentis la gravecon de la kunlaboro inter la diversaj Esperanto-organizaĵoj. Ŝi rimarkis, ke nur komune ni povas akiri sukcesojn kaj reputacion. Fine la deputitoj per siaj alparoloj helpis la sukceson de la ĝenerala kunsido, kaj ili donis kelkajn uzeblajn proponojn kaj taksadojn. Do en la fino de la ĝenerala kunsido la prezidanto de nia asocio konstatis, ke la kunsido estis sukcesa, kaj montris la entuziasman agadon de la hungaraj fervojistaj esperantistoj.
En la jaro 2016 okazis multaj interesaj kaj gravaj eventoj kaj enlande kaj eksterlande. La plej grava estis por ni la 68-a IFEF-kongreso, kiu okazis en la bulgara havenurbo *Varna*. Malgraŭ la malmultaj partoprenantoj la kongreso sukcesis bone. Okazis estrarelekto, interesaj fakprelegoj, ĝuplenaj ekskursoj kaj altnivelaj kulturaj spektakloj. La komitato taksis la agadon de la landaj asocioj kaj de la tri komisionoj kaj de la sep laborgrupoj, eĉ la komitatanoj akceptis kelkajn gravajn decidojn por plibonigi la laboron. Pri tiuj kongresaj eventoj ni jam faris raporton, kiu aperis en la 2/2016 HFM.
La alia grava evento okazis en la slovaka urbo *Nitra.* Tiu estis la 101-a Universala Kongreso de Esperanto, kie multaj hungaraj esperantistoj partoprenis, inter ili kelkaj

fervojistoj. Multaj interesaj programeroj okazis dum la kongreso, kaj ankaŭ havis sukceson la fervojista kontaktkunveno. Ankaŭ pri tiu kongreso aperis artikolo en nia faka revuo.
Okazis ankoraŭ interesaj eventoj en Hungario, kiel la 49-a ILEI-konferenco, kiun profesie organizis nia membroasocio en Nyíregyháza. Ankaŭ ili organizis la Zamenhof-memorfeston en la rezidejo de la membroasocio, kie la ĉeestantoj aŭskultis interesajn prezentadojn de la vicprezidanto de UEA, de la prezidanto de nia asocio kaj de la fama verkisto *István Nemere*. Kompreneble ankaŭ ĉe aliaj fakgrupoj kaj membroasocioj okazis interesaj eventoj dum la pasinta jaro.
En la kadro de la hungarlanda Esperanto-movado okazis kelkaj kunsidoj, kie oni elektis novan estraron, kaj ni provis ordigi niajn vicojn, kaj difini la direkton de la evoluo. Ni esperas, ke pere de la entuziasma kaj laborkapabla estraro la hungaraj esperantistoj kun-laborante agados por la sama nobla celo, por la disvastigo de Esperanto.



*La prezidantino de HEA salutas la kunsidon*

En la jaro 2017 okazos kelkaj gravaj eventoj, inter ili la 69-a IFEF-kongreso en Francio, en la pitoreska urbo *Colmar*. Laŭ la programo de la kongreso la partoprenantoj havos fakajn, kulturajn kaj ekskursajn eventojn. Ni esperas ke la nombro de la partoprenantoj signife kreskos, kion meritas la entuziasmaj francaj organizantoj.
La alia grava okazintaĵo estos la 102-a UK, okazonta en la ĉefurbo de Suda Koreio. Pro la tro granda distanco, kaj la alta vojaĝkosto ne tro multaj eŭropaj fervojistaj esperantistoj povos partopreni, sed tamen ni esperas, ke la fervojistan kontaktkunvenon oni povos organizi.

La 48-a Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo okazos en *Nyíregyháza*. La organizantoj havas sperton por akiri sukcesan renkontiĝon. Legante la programon – kiun la deputitoj de la ĝenerala kunsido akceptis – la partoprenantoj povos ĝui tuttagan ekskurson en tiu belega regiono de Orienta-Hungario. La kulturaj programoj kaj la oficiala kunsido kolorigas la tritagan kunestadon.

En la kadro de la „Zamenhof-jaro" ankoraŭ ni havos aliajn interesajn programojn ne nur en Hungario, sed en la tuta Esperantio. Do ni esperante rigardu antaŭen, kaj senlace agadu per Esperanto por Esperanto!

**István Gulyás**

# LA AVENTURPARKO ZEMPLÉN

(Dua parto)

**Supra stacio:**

Belvidejo



*Belvidejo sur pinto de monto "Magas"*

Sur la pinto de monto *(Magas-hegy)* troviĝas duetaĝa belvidejo el kiu bela panoramo aperas antaŭ okuloj de la vizitantoj. Oni povas vidi urbon *Sátoraljaújhely* ĉe piedo de la monto, la ebenaĵon de *Bodrogköz*, la ĉirkaŭajn montojn kun fortikaĵo *Füzér*, kaj en bona vetero ankaŭ pintojn de Altaj Tatroj.

Burdo *(Dongó)*

Por tiuj gastoj kiuj per helpo de la seĝa telfero atingis la montopinton, post vizito de la belvidejo ne finiĝas vico de la aventuroj. Ili povas veturi sur pinton de la najbara monto *Szár-hegy*. Inter la du montopintoj ekde 2015 trafikas etkabina telfero, kiu nuntempe estas unika en nia lando. Ankaŭ ĉi tiu telfero estas unukabla karuselo. La longo de la telfero estas 1036 m-oj, kaj inter la du finpunktoj ĝi ne havas pilonojn. La pasaĝerojn transportas du sespersonaj telfernaceloj. La plej granda alto super la ternivelo estas 152 m-oj. Daŭro de la veturo inter la du montopintoj estas 10 minutoj. Pro sekurecaj kaŭzoj la telfero ne trafikas se la ventorapido superas mezuron 36 km/h. La telfero estis inaŭgurita la 12-an de marto 2015. Antaŭ la inaŭguro la urba konsilantaro anoncis konkurson pri nomdono de la nova establaĵo. La konkurson gajnis la nomo Burdo.



*Etkabina telfero nomita "Burdo"*

Falko *(Sólyom)*

La 1036 m-ojn da distanco inter montopintoj *Magas-hegy* kaj *Szár-hegy* oni povas traveturi ne nur per etkabina telfero. Se la veturantoj en la kabino de telfero elrigardas tra la panorama fenestro ili povas vidi paralelajn kabojn. Tio estas la „Falko” per kiu dezirantoj de ekstrema aventuro povas traveturi la preskaŭ unu kaj duono kilometrojn da distanco kun rapido 80 km/h. Ankaŭ ĉi tiu ekstrema traglita

kablovojo estas unika en nia lando, Eĉ ankaŭ en Eŭropo ĝi estas konata nur en regiono de Alpoj.



Falko - inter tero kaj ĉielo

La unua traglita kablovojo (ĝia nomo estas Falko I.) estis inaŭgurita la 12-an de marto 2015. Pro la granda interesiĝo la urba konsilantaro decidis pri konstruado de la dua (ĝia nomo estas Falko II.) kiu estas uzebla ekde la 1-a de junio 2016. La dua traglita kablovojo iras paralele al la unua. La establaĵo sian nomon Falko ricevis en kadro de tiu konkurso kiu estis menciita ĉe Burdo.

Siajn travivaĵojn ĉiu entreprenema gasto povas hejmenporti, ĉar al la ekstrema traglita kablovojo apartenas aŭtomata fotoaparato, kaj la fulmorapida veturado estas eternigebla per agadkameraoj laŭ tipo *„GoPro”*. (*GoPro* estas entrepreno en Usono kiu produktas diĝitalajn videokameraojn kun granda distingivo, samtempe kun malgranda dimensio. Ili estas elstare konvenaj fiksi moviĝantajn bildojn de ekstremaj sportoj. Inter aliaj oni uzas tiuspecajn kameraojn en konkurso de *Tour de France*).

En la deira stacio oni povas lui agadkameraojn *„GoPro”*, la foto pretigita ĉe alveno estas aĉetebla en la alvena stacio.

### Monto *Szár-hegy*

***S**ur supro de la monto kapelo de Sankta Stefano konstruita en 1938 akceptas la ekskursantojn. La pripaca traktato de *Trianon*, unu el la traktatoj de la parizaj antaŭurboj, kiuj formale finis la unuan mondmiliton, dum la jaro 1920 fiksigis la disdividon de reĝlando Hungario - ĝis 1918 parton de Aŭstrio-Hungario - post la por la duobla monarkio perdita milito. Hungario definitive laŭ internacia juro perdis du trionojn de la malnovhungara teritorio. Sekve de ĉi tiu pripaca kontrakto *Sátoraljaújhely* iĝis malgranda apud landlima urbo, kiu mem estis dividita de la landlimo je du partoj. La revizia politika etoso de la postmilita erao ankaŭ en la urbo ekirigis socian agadon, Danke al tiu agado el sumo de publika monkolektado estis konstruita unika monumentaro en nia lando kies partoj estas Landa Standardo, Hungara Kalvario kaj kapelo de Sankta Stefano. La unua finpretiga elemento de la




Enirpordego de Hungara Kalvario

monumentaro estis la Landa Standardo staranta sur granda ŝtonpiramido, kiu estis inaŭgurita la 1-an de julio 1934. En Hungario tiam ĝi estis la centa Landa Standardo.

La Hungara Kalvario komenciĝas per 4 metrojn alta ŝtonpordego, kiun sekvas vojo kondukata al Landa Standardo.

Laŭirante la vojon de la Kalvario, la vizitantoj ekiras de la ŝtonpordego, kaj tabulo de trunkita *Sátoraljaújhely*. Haltante ĉe la unuopaj stacioj oni povas rememori pri la iama historia Hungario kaj pri la forŝiritaj urboj. Apud la vojo ambaŭflanke troviĝas 14 stacioj. Stacioj de la Kalvario kondukas nin tra la historia Hungario. La vojo ekiras de *Kassa* (nun *Kosice* en Slovakio) tra *Szepesség* (nun *Spiš* en Slovakio) kaj praaj minourboj kondukas nin ĝis *Komárom* (nun *Komarno* en Slovakio) kaj *Pozsony* (nun *Bratislava* en Slovakio). Ĉi tie ĝi turniĝas al sudo kaj tra *Kismarton* (nun *Eisenstadt* en Aŭstrio) kaj *Csáktornya* (nun *Čakovec* en Kroatio) iras ĝis *Fiume* (nun *Rijeka* en Kroatio). Poste sekve la urbojn de *Délvidék* (suda parto de la historia Hungario) ĝi kondukas nin al *Erdély* (nun Transilvanio en Rumanio) de kie ĝi revenas al orienta parto de *Felvidék* (norda parto de la historia Hungario).

La 14 stacioj de kristanaj Kalvarioj rememorigas la suferplenan, doloran vojon de Kristo, kondukanta de domo de Pilato ĝis monto de Golgoto. Simile la Hungara Kalvario rememorigas la vundojn kaj dolorojn kaŭzitajn de *Trianon.* Celo de la krucvojo simile al Jesua Golgoto ĉi tie estas la Landa Standardo.

La Hungara Kalvario estis inaŭgurita la 4-an de oktobro 1936. La memorlokon kompletigis la kapelo de Sankta Stefano en 1938. La kupolo de la kapelo formas la hungaran reĝan kronon.



*Antaŭ kapelo de Sankta Stefano*

Dum la dua mondmilito la stacioj suferis gravajn damaĝojn kaj komencis detruiĝi. Memkompreneble la komunisma reĝimo la Hungaran Kalvarion kaj la kapelon deklaris nacionalisto, kaj aktive partoprenis en ilia detruo. La loka urbodefenda societo iniciatis la rekonstruadon de la detruitaj monumentoj en 1989, denove per publika monkolektado.
La Hungara Kalvario denove estis inaŭgurita la 19-an de aŭgusto 1990.

**D-ro József Halász**

# La 15-a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken
**( 27.12. 2016 -03.01. 2017)**

Post unu jaro ni denove renkontiĝis en Saarbrücken por kune festi la Novjaran Renkontiĝon en gaja kaj amika etoso. La evento estas organizata de la asocio EsperantoLand. La ĉeforganizanto *Lu Wunsch-Rolshoven* kun pluraj helpantoj pretigis interesan jarfinan semajnon. Pri la programo zorgis *Betti Maul*, pri la tekniko okupiĝis *Pjotr de Mulder* kaj *Klaus Rumrich*. Al la programo multe kontribuis ankaŭ *Ines* kaj *Christoph Frank*. La Renkontiĝon partoprenis 196 geesperantistoj el 15 landoj ne nur el Eŭropo. Ĉeestis multaj familioj kun infanoj kaj gejunuloj ĝis 19 jaraĝaj.



*Prelego de Amri Wandel*

Riĉa programo kontentigis ĉiujn ĉeestantojn. Ni povis ĝui diversajn prelegojn, diskutrondojn, laborgrupojn, atelierojn, kvizojn, diversnivelajn Esperanto-lingvokursojn. Oni povis lerni ankaŭ la hispanan. Ne mankis riĉa libroservo, variaj tabloludoj, vesperaj filmoj, malstreĉiga gimnastiko aŭ ritme vigla zumbo, kurso de tango kaj ĉendancado. Intereson vekis plibonigo de memoro per la japana lingvo, budaisma meditado, balada kulturo de Feroaj insuloj, la libroarto-Orimoto kaj aliaj programeroj.

Ni eksciis kiu inventis la komputilon kaj kial la homoj neas sciencon, kien iros Eŭropo post la breksiĝo, pri la dana filozofo Martinus, pri liberalaj religioj, pri Duolingo, pri la Edena ĝardeno, pri justa komerco, pri gravitaj ondoj, pri Esperanto en Afriko, pri perspektivoj de Eŭropa Unio kaj eĉ pri bano, duŝo kaj necesejoj tra la mondo. Interesis nin matematika prelego pri senfineco, ĝiaj problemoj kaj paradoksoj, la historio de Kubo kaj Usono, la vivo sur strangaj mondoj kaj la vivo sur la orientfrisaj insuloj.


*Aŭskultantoj dum la prelego*

Ni diskutis pri monda politiko, pri enmigrantoj, pri disvastigo de Esperanto, pri ReVo (Reta Vortaro). La projekton "Unu leciono pri Esperanto, por ĉiuj lernejanoj" proponis *Lu Wunsch-Rolshoven*. Pri la demando "Ĉu normalaj infanoj ankoraŭ ekzistas?", prelegis kaj diskutis *Martin Markarian*. Pri "Ĉu reguligita laŭleĝigo de kanabo estas dezirinda?" raportis kaj diskutis *Markos Kramer*. *Gijom' Armid* organizis seminarion pri "Vivi por feliĉi aŭ feliĉi por vivi?"

Okazis tradukateliero kun *Brian Moon* kaj *István Ertl*, konstruo de sorobano kun *Kimie Markarian*, ”Risko-kvizo” kun *Edy Van den Bosch,* scienca kvizo por teamoj kun eksperimentoj kun *Klaus Rumrich*, skeĉoj de *Mirejo Grosjean* okaze de la “Jaro de la lernanto”.



*Helmut Klünder prelegas pri orientfrisaj insuloj*

Ni spektis bildprezentojn de *Amri Wandel* pri *Slovakio, Slovenio*, *Montenegro* kaj pri *Petra*, la antikva mistera ĉefurbo en la jordana dezerto. *Bernard-Regis Larue* gvidis nin tra parkoj de *Yellowstone* kaj *Colorado* en Usono. *Ulrich Brandenburg* rakontis kaj montris interesajn bildojn pri Portugalio, kie en la jaro 2018 en *Lisbono* okazos la 103-a Universala Kongreso. Li donis al ni emon partopreni ĝin.

Ankaŭ la infanoj ĝuis tre riĉajn programerojn en multaj atelieroj. Interesis ilin pretigado de pilkoj por ĵonglado, origamio, fabrikado de strigoj kaj aŭtoj el kartono, pupetoj el ŝtofoj. Ne mankis rostado de bananoj kun ĉokolado, preparado de filmeto farita el fotoj, poŝtranĉiloj, kantado, ĵonglado, feltumado kaj ornamo sekvis “Mazi-kurson”. Plaĉis al ili ludado kun samaĝuloj kaj libera petolado. Dum la paŭzoj virinoj trikis, iuj komputilis, legis, kartludis aŭ babilis ĉe glaso da vino, biero aŭ kafo.



*Vespera koncerto de ĴeLe*

Estis prezentitaj fotoj el la pasintjara Novjara Renkontiĝo, beletra Almanako. Vespere ni ĝuis pup-teatraĵon: "Avino! kriĉas Filipo" fare de *Christoph Frank*, koncerton de ĴeLe kun akompano de la kubano *Geomar*. Plezure koncertis ankaŭ *Gijom*' kaj *Kim*. Dum la Internacia vespero prezentiĝis niaj talentuloj. Ni ĝuis pian-, kontrabas-, violon-, kaj flut-ludadojn, ĵongladon, ĥor-kantadon, dancadon, kanĵi-kvizon kaj skeĉojn de *István Ertl*. Ĉe la fino *Lu Wunsch-Rolshoven* dankis al ĉiuj kontribuintoj kaj al la partoprenintoj de la aranĝo.

Gaje ni bonvenigis la Novan Jaron per tostoj, kisoj kaj bondeziroj de ĉio bona por la jaro 2017, esperante denove renkontiĝi jarfine en Novjara Renkontiĝo.

**Liba Gabalda**

# AL ANDALUS

**Aventura rondvojaĝo en luksa realigo**

*En la lastaj jardekoj kreskis – kiel fungo post pluvo – luksaj trajnoj en la tuta mondo. Vojaĝi kaj ĝui la vidindaĵojn kaj la luksajn provizadojn estas neforgesebla travivaĵo, kaj kompreneble tro multekosta. Jam en la pasinta jarcento ekzistis multaj luksaj trajnoj, sed la plej luksaj kaj multekostaj estiĝis en la nuna jarcento. Ni mencias kelkajn famajn luksajn trajnojn, kiuj trafikas en diversaj landoj, kontinentoj. Nov Zelando (Eastern kaj Oriental Express), Aŭstralio (Ghan, Sunlande), Ĉinio (Shangri-La Express), Japanio (Hokkaido Express), Rusio (Transsiberia Golden Eagle), Hindio (Darjeeling Himalayan Train, Palace on Wheels), Afriko (Blue Train, Rovos Rail), Sudameriko (Andrean Explorer, Hiram Bingham), Nordameriko (Rocky Mountaineer, Royal Canadian Pacific), Eŭropo (Bernina Express, Flam Railway, Bergen Railway, Glacier Express, Royal Scotsman, Danube Express). Por Hungario estas la plej grava luksa trajno la „Orient Express", kiu nun trafikas iomete sur aliaj fervojaj linioj kun nomo „Venice Simplon-Orient Express".*
*Nun ni prezentas unu el la plej famaj luksaj trajnoj en Eŭropo, la „Al Andalus".*



*La trajno "Al Andalus" en stacidomo*

En regiono de suda Hispanio, terenon de la siesto, flamenko kaj taŭrluktoj preterglitas la *Al Andalus,* nome la Ekspreso Andaluzo, plej multekosta kaj plej bela trajno de Eŭropo, kiu ricevis la nomon ruliĝanta hotelo.
Pri la plej multaj luksaj trajnoj estas rakontebla, ke iliaj vagonaroj iam transportis reĝojn kaj reĝedzinojn de la malnovaj epokoj. Ne estas alimaniere ankaŭ ĉe *Al Andalus,* trairanta la sudhispanan regionon, kiu originale servis la komforton de la angla reĝa familio, por ke ili dum tempo de la ferioj alvenu el *Calais* ĝis la Riviero.

La veturiloj, pretigitaj en Francio dum la 1920-aj jaroj suferis la jarojn de la milito; post kiam silentiĝis la ĥaoso kaj Eŭropo komencis reviviĝi la veturiloj estis transportitaj en Hispanion, kaj fine de la 60-aj jaroj oni spiris novan vivon en ilin, kaj en 1985 la trajno estis ekveturiga.

**Reĝaj privilegioj**

Samtempe la vojaĝon povas partopreni entute 64 personoj, en ĉiu vagono troviĝas ses iom malgrandaj apartamentoj el kiuj depende de nia kunvojaĝanto ni povas elekti dulitan aŭ ĝemellitan; krome troviĝas du grandegaj superklasaj apartamentoj, kiuj havas ankaŭ propran banĉambron por la reĝa komforto. En la trajno zorgeme selektitaj

majstraj manĝaĵoj de elstaraj ĉefkuiristoj dorlotas la gustoburĝonojn, konvene al la loka kuirarto, en iu ajn parto de la tago. Komence de la riĉa matenmanĝo, tra la sepplada tagmanĝo, ĝis la vespermanĝo akompananta per viva muziko ĉiu manĝado estas parto de la servo.



La restoracia vagono

**Tiuj feliĉaj pactempoj**

Pri la trajno – kiu ekveturas el *Sevilla* kaj post sep tagoj revenas al la sama loko – ĝenerale oni kutimas uzi la esprimon kvinstela hotelo ruliĝanta sur reloj, ĝia filozofio kaŝiĝas en tio, ke la gastoj tute simple fartu hejme. Ja, por unu el la plej multekostaj trajnoj de mondo sole tio estas malmulta – por unu persono la bazkvalita ĉambro kostas 3500 eŭrojn, sed la superkvalita apartamento 4100 eŭrojn – tiel la hejmeca sento kompletiĝas per ekskluzivaj servoj: gvidataj ekskursoj, nefogeseblaj gustoj de la manĝaĵoj servataj sur la ferdeko, dume la dekoracion de nia vojaĝo donas la pompo de malnovaj tempoj. La interno laŭ stilo rememorigas la *„Belle Époque”*-n, nome epokon de la jarcentŝanĝo kaj la feliĉaj pactempoj, en kavalkado de la ellaboritaj juglandlignaj elementoj, grandegaj speguloj, foteloj remburitaj per vera ledo kaj silko gajnas terenon la ĉiama franca eleganteco.

**Virinaj herooj, vinoj, moskeoj**

Do, la programo komenciĝas en *Sevilla* per urborigardo, kie perdiĝi en la kaŝitaj stratetoj kaj en etaj drinkejoj kafumi same tiel estas parto de la programo, kiel admiri simbolon de la urbo, la Oran turon, aŭ la malnovan tabakfabrikon, kiu estis fundamenta ŝtono de riĉeco de la urbo, kaj laborloko de *Carmen,* virina heroo de unu el la plej famaj operoj de la mondo. Post la ekskurso bongusta vesper-manĝo atendas la gastojn, dume la trajno ekruliĝas el la stacio kaj eĉ ne haltas ĝis *Jerez*, ĝis loko de la una kaj dua noktoj.

Interesaĵo de la itinero estas, ke por la perfekta ripozo nokte la trajno staras samloke, tiel ĝi senhavigas siajn pasaĝerojn nek



La salono

de vidaĵoj de la traveturata pejzaĝo, nek de la kvietaj sonĝoj. Post la abunda matenmanĝo la program en *Jerez* estas vizito de tipa vinkelo, sekve la facilan tagmanĝon oni akompanas la popolon al bordo de rivero *Guadalquivir.* Antaŭtagmeze de la tria tago ĉarmo de *Cádiz,* unu el la plej malnova Eŭropa urbeto atendas la turistojn, post la sepplada tagmanĝo konsumita en la trajno la hotelo ruliĝanta sur la reloj alvenas en urbon *Ronda* en lokon de la sekvanttaga ekskurso. Forlasinte urbon *Ronda* pli nova, impona urbo aperas antaŭ niaj okuloj: konekse kun naskiĝloko de la flamenko la hispanoj opinias, se vi ne vidis urbon *Granada*, vi ankoraŭ vidis nenion. Ĉi tie la unuanombra vidindaĵo estas la *Alhambra*, fascina palacogrupo, konstruita dum tempo de okupacio de maŭroj, tiel ankaŭ la *Generalife* somera palaco de la sultanoj kaj romantika labirinto de la palacoĝardenoj. La sesan tagon la fina celo estas *Cordoba,* kie denove ni povas admiri postsignojn de la maŭra arkitekturo dise en la urbo, ne menciante unu el la plej kuriozaj moskeoj de la mondo *Mezquita*. La sepan tagon la trajno sen halto preterglitas el *Cordoba* ĝis *Sevilla,*kiam inter la manĝadoj tasko de la pasaĝeroj estas sole prilabori la eventojn de la pasinta semajno kaj rememori pri mirakloj de Andaluzio.



*Luksa kupeo por du personoj*

**Interesaĵoj**

- En 1974 en ĉi tiu trajno oni filmis filmon naskiĝintan el plumo de *Agatha Christie* titolitan Murdo en Orient - ekspreso, kiu samtempe famkonatigis ankaŭ karakteron de la belga detektivo *Hercule Poirot*
- *Dress Code*: (preskriboj por vestaĵo) ĝis kiam dumtage ĉiu preferas la komforton, ĝis tiam por la vespermanĝo konsumata en la ferdeko oni devas doni siamanieron, ekzemple la viroj decas porti kompleton kaj kravaton
- Andaluzio dum multaj jarcentoj estis sub maŭra okupacio, kiu restis postsignojn same en la kulturo, arkitekturo tradicioj. *Alhambra*, *Generalife* kaj urboparto *Albaicin* tuŝitaj dum la vojaĝo kune kun donas unu el la 38 mondheredaĵaj trezoroj de Hispanio
- La luksa trajno trafikas sur la andaluza etapo en ĉiu jaro duoble du monatojn, printempe en aprilo kaj majo, aŭtune en septembro kaj oktobro. Ni povas elekti inter kvar- aŭ sestagaj vojaĝoj, tamen la vera estas la aventuro iranta de *Sevilla* ĝis *Sevilla*, inkluzivanta sep tagojn kaj ses noktojn.

*(Fonto Vikipedio)* **D-ro József Halász**

# NATURPARKOJ EN HUNGARIO

En la 1/2017 numero de nia faka revuo „Hungara Fervojista Mondo” mi detale skribis pri la hungariaj naciaj parkoj. En tiu artikolo mi anoncis, ke en la sekva numero mi prezentos la hungariajn naturparkojn, ties rolojn en la konservado de la naturaj kaj kulturaj heredaĵoj, la plej gravaj aktivecoj kaj funkciadoj de tiuj, eĉ la rolojn de la interrilatoj kun la fervojo. Al tiu konigo donis helpon al mi s-ro **Béla Básthy** prezidanto de la “Hungara Naturpark-Asocio” kaj samtempe de vicurbestro de urbo *Kőszeg*.



*La kelovico en Cák*

Estimata Prezidanto! Mi dankas vian afablan akcepton de mia invito, kaj vi respondas al miaj demandoj en tiu grava temo, kiu influas la sortojn kaj vivojn de la homoj. Unue mi gratulas al vi pro la refoja elekto de via prezidanteco en la Naturpark-Asocio.

**1./ Mia unua demando estas ege simpla: Kio estas la „naturparko”?**

La naturparko estas regionnivela kunagado, kiun establis lokaj komunumoj. La celo de tiu estas la protektado, konservado kaj prezentado de la naturaj kaj kulturaj heredaĵoj, kaj helpo al la evoluado de la regiono.

**2./ Kio estas la diferenco inter la „naciaj parkoj” kaj la „naturparkoj”?**

La naciaj parkoj estas naturrezervejoj sub ŝtata protekto kaj manipulado. Tiujn manipuladajn taskojn okazigas la Direkcioj de la Naciaj Parkoj, kaj la teritorio de la funkciado determinas dekreton de la kabineto. Iliaj aktivecoj etendiĝas pri la protektado de la naciaj parkoj kontraŭ tiuj aktivecoj, kiuj endanĝerigas la ekvilibron de la ekologio, eĉ pere de vizito-centroj ili prezentas la flaŭrojn kaj faŭnojn de la naciaj parkoj.
La naturajn parkojn establas lokaj komunumoj, do praktike la lokaj aŭtonomioj, kaj iliajn aktivecojn akordigas la Hungara Naturpark-Asocio. La multkoloraj hungaraj regionoj havas nenombreblajn signifajn naturajn kaj kulturajn valoraĵojn, kies konservado kaj protektado, eĉ utiligo kaj prezentado estas elementa intereso de la provincaj organizoj kaj ties kondiĉoj de sukcesaj evoluigoj. Do la estetike kaj ekologie altvalora regiono, kiun komune formis la naturo kaj homo estas tasko la naturprotektado kaj la evoluigo.

**3./ Ĉu vi povus koncepti la plej gravajn aktivecojn de la naturparkoj?**

Tiujn aktivecojn plej bone montras kvarpersona modelo:

- la protektado de natura kaj kultura heredaĵo;
- media edukado kaj vidmaniera formigo;
- turismo kaj ripozo;
- evoluigo de la regiono.

**4./ Kiam kaj kie komenciĝis la iniciato de la establo de la naturaj parkoj en Hungario?**



*Paŝtiĝa grego en la naturparko*

En la jaro 1991 la hungara-aŭstra komitato, kiu preparis la fondon de la „Fertő-Hanság Nacia Parko” lanĉis unue, ke flanke de la naciaj parkoj estus laŭcele fondi naturparkojn laŭ aŭstra modelo, kiuj bone kompletigus la aktivecon de la naciaj parkoj. La proponon sekvis ago, kaj en 1997 la kolonioj de la montaro *Kőszeg* fondis la „Irottkő Naturparkon”, kiu en 2006 ricevis la ministran aprobon por la „Naturparko” nomuzado.

**5./ Kiom naturparkoj estas en Hungario?**

Ĝis nun ni fondis entute naŭ naturparkojn: „Vértes” (2005), „Irottkő” (2006), „Pannontáj-Sokoro” (2006), „Cserhát” (2009), „Szatmár-Beregi” (2010), „Hét Patak Gyöngye” (2011), „Gerecse” (2013), „Koppányvölgy” (2014), „Körösök Völgye Naturpark” (2015). Krom tiuj naturparkoj estas en prepariĝo kelkaj naturparkoj, kiel ekzemple la „Budakörnyéki Naturpark”.

**6./ Kio estas la taskoj de la Hungara Naturpark-Asocio?**

La Asocio havas momente 13 membrojn, el kiuj naŭ havas „Naturpark” nomuzadon. Inter la taskoj de la Asocio rolas la elformigo de la naturparka modelo laŭ la hungara interrilato, ĝi partoprenas en la elformado de la jurregulaj kaj evoluigaj medioj. Inter la taskoj de la Asocio estas ankoraŭ la interesakordigo inter la naturparkoj, la nacia kaj internacia reprezentado, tenado de la interrilato kaj la komunikaĵo, organizado de la fakulaj fundoj, la taksado de la naturparkaj spertoj kaj la helpo de la pozitivaj roloj de la unueca evoluo de la naturparka movado en la kadro de la naturprotektado kaj regionevoluado.

**7./ Ĉar nia revuo – HFM – estas esperantlingva fervojfaka revuo, niajn legantojn interesas pri la rolo de la fervojo en la naturparkoj. Kia maniere vi vidas tion?**

Konate la koloniojn de la naturparkoj ni povas konstati, ke ĉiuspecaj fervojaj trafikoj troviĝas en la hungaraj naturparkoj. Por ke mi diru kelkajn ekzemplojn mi mencias, ke

fervoja ĉeflinio ekzistas en *Tatabánya, Tata, Szárliget, Békéscsaba* ktp. Duarangaj fervojoj, eĉ arbaraj, provincaj fervojoj praktike en ĉiuj naturparkoj troveblas. Tiuj fervojlinioj certigas grandan parton de la trafiko por la tie vivantaj homoj. Ili helpas la turismon, kaj ankaŭ ludas grandan rolon en la vartrafiko. En la 1970-aj jaroj oni ĉesis multajn duarangajn fervojliniojn en Hungario, kio donis multajn problemojn en la vivo de la naturparkaj kolonioj. La renovigintaj ŝoseoj nur parte povis anstataŭigi la fervojan trafikon. Ni esperas, ke okaze de la fervojaj renovigoj en Hungario oni ne malatentis la deziron eĉ pretendon de la naturparkoj.

**8./ Kio estas la situacio en aliaj eŭropaj landoj rilate al la naturparkoj?**

La Hungara Naturpark-Asocio ekde 2012 partoprenas kune kun la germana, aŭstra, svisa, luksemburga kaj slovena partneroj en la mezeŭropa naturparka kunlaboro. Mi mencias ekzemple, ke Germanio havas 104 ŝtate rekonitajn naturparkojn, en Aŭstrio 48, Svislando 15, Francio 48 kaj en Luksemburgio 2 naturparko ekzistas. Ĉiuj landoj havas landajn specifecojn en la naturparkaj aktivecoj, sed la fundamentaj celoj en ĉiuj landoj estas samaj.

**9./ Fine mi petas vin, bonvolu diri kelkajn karakterizajn indikojn kaj mallongajn informojn pri la hungarlandaj naturparkoj.**

En la vicordo de fondoj tiuj estas la sekvaj:

*„Vértesi" Naturparko:*

Tiu naturparko troveblas en la Mezmontaro de Transdanubio, kaj enhavas la tutan montaron „Vértes", kaj grandan parton de la bazeno „Zámoly". Sur la 36 mil hektaraj teritorio troveblas 17 kolonioj, el kiuj la plej gravaj estas *Oroszlány, Mór, Csákvár*, *Szárliget.*



*Lokaj produktaĵoj en la naturparkaj kolonioj*

La plej ĉefaj celpunktoj estas unuavice la vilaĝa turismo, la prezento de la lokaj gastronomiaj kutimoj, la ekskursoj per la dezertaj aŭtobusoj, la arbaraj lernejaj okupigoj, muzikaj someraj vesperaj koncertserioj, naciaj aranĝaĵoj, ĉevaleks-kursoj, la diversaj aranĝaĵoj de la vizito-centro en urbo *Csákvár,* festivaloj, fortikaĵ ludadoj en la fortikaĵo *Csókakő*, vintagoj en urbo *Mór* k.a.

Inter la lokaj produktaĵoj estas menciindaj la vinoj el *Mór*, la domaj bieroj el *Zámoly*, la grizbovaj kaj bubalaj kolbasoj, diversaj regionkarakteraj manĝaĵoj, la potfaristaj produktaĵoj el *Csákvár* ktp.

*„Irottkő” Naturparko:*

La naturparko etendiĝas en la regiono de la Okcidenta-Transdanubio, la nordokcidenta parto de la departemento *Vas*. Ĝi ricevis sian nomon pri la 882 metrojn alta montopinto Irottkő. Tiu 25 mil hektaraj teritorio enhavas 16 koloniojn, inter tiuj la plej gravaj estas *Kőszeg, Bozsok, Cák, Velem*.

La plej ĉefaj celpunktoj estas la fortikaĵo, la malnova urboparto kaj la muzeoj en la urbo *Kőszeg*, ankaŭ en *Kőszeg* la Naturprotekta Vizito-centro, la birdprotekta modelloĝigejo. Interesa estas la elvidejo de *Irottkő*, la kapelo *Sankta Vid*, la “Kalvario”, la „Sepbolado”, la kelovico en *Cák*, la akvomuelilo kaj la kreadomo en *Velem*, la kastelo „Sibrik” en *Bozsok*, la bicikloekskursoj, lokhistoriaj promenadoj ktp.

Inter la lokaj produktaĵoj estas menciindaj la marono, pomo, sekigitaj fruktoj kaj la vino. Krome estas diversspecaj marmeladoj, refreŝigaj trinkaĵoj, fungoj eĉ manufakturaj produktaĵoj.

*„Pannontáj-Sokoro” Naturparko:*

Tiu ĉi naturparko enhavas la montetregionon de *Sokoro*, kaj parte la regionon de malsupra „Bakony”. En la 63 mil hektaraj teritorio troveblas entute 29 kolonioj, el kiuj la plej signifaj estas *Pannonhalma, Nyúl, Sokorópátka, Veszprémvarsány, Győrszemere*.

La plej ĉefaj celpunktoj estas la ĉefabatejo kaj la botanika ĝardeno de *Pannonhalma*, ekskursoj en la naturprotekta distrikto, ĉeval- kaj ĉasturismo, demonstraciaj vojstrekoj kaj arbaraj lernejoj ktp.

La plej gravaj lokaj produktaĵoj estas la mielo, vino, vinberoj kaj diversspecaj fruktoj. Gravaj estas la kuracplankoj, eĉ la disvastigo de la manufakturaj industrioj.

*„Cserhát” Naturparko:*

La naturparko troveblas en la mezo de la departemento *Nógrád*, kion oni nomas „Palócföld”. La teritorio de tiu estas 38 mil hektaroj, en kiu 22 kolonioj aliĝis al la naturparko. La plej karakterizaj kolonioj estas *Hollókő, Buják, Cserhátsurány, Nagylóc* kaj *Terény.*
La plej ĉefaj celpunktoj estas la malnova vilaĝparto kaj la fortikaĵo de *Hollókő*, la naciaj kostumoj de *Rimóc* kaj *Buják*, la ruinoj de la fortikaĵoj de *Szanda* kaj *Buják*, la preĝejo el epoko de *Árpád* en *Nagylóc*, puntmuzeo, palóc-kermeso, vinberrikoltaj defiladoj.

El la lokaj produktaĵoj estas la plej signifaj la kuracplantoj, fromaĝoj, marmeladoj kaj vinoj. Estas grava por ni, ke *Hollókő* estas la unua vilaĝo, kiu estas listigita en la „Natura Monda Heredaĵo” de Unesko.

*„Szatmár-Beregi” Naturparko:*

La naturparko etendiĝas sur la plej orienta ekstremaĵo de nia lando, norda parto de la „Nord-Ebenaĵo”, ĉe la riveroj *Tisza, Szamos, Kraszna* kaj *Túr*. Ĝi havas 104 mil

hektarajn teritorion, en kiu entute 67 kolonioj troveblas. La plej karakterizaj kolonioj estas *Fehérgyarmat, Kisar, Túristvándi, Szatmárcseke*.

La plej ĉefaj celpunktoj estas la preĝejoj en *Szatmár* kaj *Bereg*, la lignaj sonorilejoj, la vizitcentro en *Kisar*, la efemero, akvaekskursoj, la akvamuelilo en *Túristvándi*, la tombejo en *Szatmárcseke* kun la tombo de la fama poeto *Ferenc Kölcsey*, kiu verkis la tekston de la hungara Himno, ekskurso per biciklo sur la plej longa biciklivojo de nia lando.

El la lokaj produktaĵoj estas menciindaj la karakterizaj manĝaĵoj, la prunbrando kaj marmalado, la diverspecaj pomoj, eĉ la *Berega* krucmaŝa brodaĵo.

*„Hét Patak Gyöngye" Naturparko:*

Unu el la plej malgrandaj naturparkoj estas ĉi tiu naturparko. Ĝi havas 10 mil hektarajn teritorion, kiu etendiĝas en la landpartoj „Völgység" kaj „Nordzselic". La nombroj de la kolonioj estas nur 8, el kiuj estas la plej gravaj *Alsómocsolád, Csikóstőttős, Kárász* kaj *Kisvaszar.*



*Tipa kamparana domo en la "Hét Patak Gyöngye" naturparko*

La plej ĉefaj celpunktoj estas la kastelo „Sztankovánszky", la romkatolika preĝejo en *Alsómocsolád*, preĝejo kaj la garbejoj en *Csikóstőttős*, akvomuelilo en *Kárász*, la kastelo „Eszterházy" en *Kisvaszar*, la putdomoj kaj la fositaj vinkeloj en la leŭsomuro.

El la lokaj produktaĵoj ĉefe la lokaj manĝaĵoj, akacimielo, diverspecaj fungoj, kaprofromaĝo kaj brando estas la plej karakterizaj.

*„Gerecse" Naturparko:*

La naturparko etendiĝas sur la 50 km-ojn longa valo de la Danubo ĉe la regiono „Kisalföld", kaj sur la teritorio de la montaro „Gerecse". La teritorio de la naturparko estas 80 mil hektaroj, kaj entute 29 kolonioj entreprenis la komunan vojon en la kadro de tiu naturparko. La plej signifaj urboj kaj vilaĝoj estas sur la tereno de la naturparko: *Tata, Tatabánya, Tokod, Nyergesújfalu, Vértesszőlős* kaj *Neszmély*.

La plej ĉefaj celpunktoj estas la „Öregtó" kaj la ĉirkaŭaĵo en la urbo *Tata*, la prahoma kolonio en *Vértesszőlős*, la industriaj ekspozicio kaj muzeo en la urbo *Tatabánya*, la monumento „Turul" sur la monto ĉe *Tatabánya*, la kastelo „Metternich", la mueleja

valo ĉe *Tardos*, botanikaj ĝardenoj en *Agostyán* kaj *Lábatlan*, studvojstrekoj, festivaloj ktp.

El la lokaj produktaĵoj mi mencias la bonegajn vinojn, fromaĝojn, mielojn, marmeladojn kaj la kreaĵoj de la ŝtonskulptistoj en Süttő.

*„Koppányvölgy" Naturparko:*



*Ripozo inter du spektakloj en la naturparko*

Tiu naturparko etendiĝas en la valo de la rivereto *Koppány*, 30 km-ojn de la lago *Balatono*. La surfaco de tiu naturparko estas la plej malgranda inter la naturparkoj, ĉar havas nur 400 hektarojn. Tiu kuntenas la plej primitivaj etvilaĝoj de la regiono „Ekstera Somogy". Nuntempe nur 10 vilaĝoj apartenas al la naturparko.

Ankaŭ ĉi tie ekzistas ĉefaj turismaj celpunktoj, kiuj ankoraŭ malpli estas vizitantaj, sed la objektaj valoroj de la ŝvaba kamparana kulturo, la malnovaj kamparanaj domoj de la etvilaĝoj, la relative sendifekte konservigita vilaĝbildo meritas la plimultigon de la vizitoj. En tiu regiono troveblas kapeloj, preĝejoj, vicoj de keloj, statutoj kaj lignaj sonorilejoj, kelkaj gastejoj kaj restoracioj.

El la lokaj produktaĵoj la plej karakterizaj estas unuavice la produktaĵoj de la kamparanaj bienetoj, kaj la domproduktataj viandoj, marmeladoj, mieloj ktp.

*„Körösök Völgye" Naturparko.*

La vertolinion de la teritorio de tiu naturparko formas la riveroj Körös laŭ la hungara-rumana landlimo. Tiu 208 mil hektaraj teritorio enhavas 14 koloniojn, el kiuj estas la plej gravaj *Békéscsaba, Gyula, Mezőtúr, Szarvas, Békés, Mezőberény*.

La plej ĉefaj celpunktoj estas la termal- kaj kuracakvoj, la akvoekskursoj sur la riveroj *Körös*, eĉ ties mortbrakoj, fiŝkaptistaj konkursoj, biciklistaj rondekskursoj ktp. En la urbo *Békéscsaba* funkcias nova vizitcentro, kiu estas la bazo de la diversaj medio- kaj naturprotektataj iniciatoj, eĉ kulturaj kaj turistikaj programoj.

Inter la lokaj produktaĵoj oni povas trovi pretigadon de la ŝaf- kaj porkviandoj, prunbrandon kaj produktaĵojn de la manufakturaj industrioj.

Sinjoro Prezidanto mi dankas vian informadon kaj respondon al miaj demandoj. Mi deziras al vi multajn sukcesojn en la organizado de la naturparkoj, kaj en la internacia kunlaboro. En la helpo de la plia evoluigo, kaj establo de novaj naturparkoj mi deziras antaŭenpaŝojn.

**István Gulyás**



**Virinoj en naciaj kostumoj en „Palócföld”**





**Provincaj fervojoj en Hungario**